



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

Por la 100-a n-ro, glorie kroniganta la 10-jaran ekzistadon de nia kara „ESPERO KATOLIKA”, tiun ĉi raporton oferas ĝia malnova kunlaboranto

Kovno 6. X. 13.

P-ro A. DOMBROVSKI.

Esperantista Movado inter Katolikoj de 1887—1910.¹⁾

Estimataj Gesinjoroj.

Mi havas la honoron raporti al vi pri la esperantista movado inter katolikoj. Pro timo vin tro enuigi mi ne povas detale paroli pri tiu ĉi vasta temo. Tial mia raporto estos nur mallonga historia skizo, el kiu vi ekvidos, kio estas farita de katolikoj por kaj per Esperanto. Post tiuj kelkaj antaŭparolaj vortoj, permesu, atestimataj gesinjoroj, ke mi direkte alpaŝu al mia temo.

La komenco de esperantista movado inter katolikoj kuniĝas kun la komenco de „Esperanto” mem. La unuaj esperantaj broŝuretoj de D-ro Zamenhof, aperintaj en 1887 en rusa, pola kaj germana lingvoj sukcesis altiri al Esperanto inter aliaj anoj ankaŭ nemalmulte da katolikaj laikoj, kelkajn pastrojn kaj unu episkopon S-ron Zerr el Saratov.

¹⁾ Raporto legita en Kovna Esperantista Societo, en 1912.

Dissemitaj en la granda rusa imperio, ordinare nekonantaj unuj la aliajn, tiuj ĉi unuaj ruslandaj esperantistoj katolikaj malmulte povis fari por la propagando Esperanta inter siaj gereligiuloj. La ĉefa kaŭzo de tiu ĉi malsukceso estis la manko da konvena organizacio. Eksteraj cirkonstancoj, kiuj eĉ nun ne estas ĉe ni tro favoraj al la esperantismo, tiam, antaŭ 24 jaroj donadis preskaŭ nenian eblon por krei ian societon de ruslandaj esperantistoj katolikaj. Ĉiu el ili povis labori nur aparte, laŭ sia plano kaj bontrovo.

Tamen nia afero ne restadis tute sen movo. Ĝi paŝo post paŝo iradis antaŭen, disvastiĝante malrapide, sed konstante. Fine ĝi transiris la limojn de Rusujo, atingis la alilandujon kaj plej fortike enradikiĝis en nia amiklando — Francujo.

Dank' al energia agado de S-ro de Beaufront tie estis fondita la konata „franca societo por la propagando de Esperanto”, kiu ekkomencis regule eldonadi monatan ĵurnalon „L' Esperantiste” en la franca kaj Esperanta lingvoj. Inter la membroj de l' dirita societo kaj abonantoj de l' dirita ĵurnalo multaj estis katolikaj. Sur la neŭtrala lingva fundamento ili povis tute paceme laboradi kun siaj ideoj kontraŭoj — masonoj kaj liberpensuloj. Kompreneble „L' Esperantiste”, kiel organo de la societo pure propaganda, estis ankaŭ kondukata en pura nur poresperanta direkto. S-ro de Beaufront mem, kvankam fervora katoliko, ne povis doni en sia ĵurnalo multe da loko por specialaj katolikaj aferoj kaj demandoj.

Sed aliflanke dank' al konstanta multiĝado de esperantistoj katolikaj, precipe en Francujo, oni komencis pli kaj pli sentadi la bezonon de aparta katolika esperantista societo kaj revuo. Oni atendadis nur iniciatoron. Kaj tiu ĉi iniciatoro baldaŭ aperis. Li estis la energia kaj talentplena abato EMILO PELTIER.

Kiom mi memoras, je l' fino de 1902 li dissendis al diversaj plej konataj esperantistoj katolikaj alvokon kun la demando, ĉu jam ne estus oportune por la katolikoj esperantistaj sin organizi aparte kaj ekkomenci la eldonadon de sia propra organo.

La respondoj estis favoraj. Ĉirkaŭ 80 katolikaj esperantistoj promesis helpi la noblan iniciatoron per monoferoj kaj kunlaborado en la estonta ĵurnalo.

Dank' al tio ĉi, en Decembro de 1902 abato Peltier komencis elirigadi la malgrandan kvarpaĝan verdan folieton en Esperanto, ektitolitan „Espero Katolika”, kiel aldonon al franca revueto „L' Aube”.

La unua numero de tiu ĉi unua katolika esperanta organo alportis jam la regularon de la societo „Espero Katolika”, kies unua regulo estis esprimita per jenaj vortoj:

„La societo „Espero Katolika”... havas la celon — vastigi en la mondo katolika per ĉiuj rimedoj eblaj kaj leĝaj la idiomon, kreitan de D-ro Zamenhof sub la nomo Esperanto.

„Ĝi penados atingi tiun ĉi celon per la produktado kaj dissemado de ĉiuj katolikaj verkoj en Esperanto. Ĝi organizos ĉie, kie ĝi povos, paroladojn, kunvenojn, kursojn pri Esperanto en katolikaj universitatoj, lernejoj, seminarioj k. t. p.” Jara kotizaĵo por anoj de E. K. estis 2 fr., por „bonfarantoj” — 100 fr.

Petante por tiu ĉi regularo aprobon de sia Eklezia estro — ĉefepiskopo de Tours, abato Peltier skribis:

„Esperanto estas idiomu neŭtrala. Ĉiu homo povas ĝin uzi laŭ siaj deziroj. Oni povas ĝin ŝati, kiel rimedon por interŝanĝi ilustritajn kartojn aŭ kolektadi poŝtmarkojn. *Sed ni katolikoj* povas konsideri Esperanton, kiel mirindan rimedon por faciligi rilatojn kun niaj alilandaj fratoj kaj por realigi la vorton de Nia Sinjoro „kaj estos unu ŝafaro kaj unu paŝtanta”.

La ĉefepiskopo respondis, ke li „tre volonte aprobas tiun ĉi projekton”, kiu al li ŝajnas „favori la vastigadon de l' Evangelio kaj interproksimiĝon de l' popoloj”.

Tiamaniere estis metita fundamento por la plua disvastigo de Esperanto inter la franca kaj alilanda katolikaro. La diversnaciaj katolikoj de nun estis jam posedantaj sian propran esperantistan revuon kaj sian propran esperantistan societon, devintan zorgi pri la regula elirado de tiu revuo, sed bedaŭrinde malmulte pri ĝi zorgintan. La ĉefa

zorganto kaj direktoro de ambaŭ tiuj ĉi aferoj, kompreneble, estis tiu sama senlaca abato Peltier.

Dank' al lia sindonemo kaj laboro „Espero Katolika” post unu jaro fariĝis el la aldono al „L' Aube” tute sendependa okpaĝa ĵurnaleto kaj en marto de 1905 ĝi kvarobligis atinginte grandecon de 32 paĝoj in-8 kun 4-paĝa verda kovrilo. Tia ĝi restas ankaŭ nun; nur ĝia kovrilo el kvarpaĝa fariĝis okpaĝa.

La kunlaborantojn E. K. havis sufiĉe multajn. Sed la nombro da abonantoj (komence nur 300) estis nesufiĉa. Tiun ĉi bedaŭrindan fakton oni povas klarigi per diversaj kaŭzoj. Unue multaj kleraj katolikoj konantaj lingvon latinan, komune uzatan en la tuta katolika eklezio, ne sentis la bezonon de alia lingvo internacia; due multaj sin rilatis al Esperanto iom suspekteme, kiel al eltrovaĵo ne katolika. Por kelkaj eĉ la kvinpinta esperanta steleto ŝajnis esti masona signeto...

Al ĉiuj tiuj ĉi antaŭjuĝoj estis metita fino per la apostola beno, kiun Lia Papa Moŝto Pio X donis al „Espero Katolika” la 27-an de Junio 1906.

Tiu ĉi publika favoro veninta el Romo montris al ĉiuj katolikoj, kontraŭuloj de Esperanto, ke la plej alta Eklezia estraro trovas en tiu ĉi neŭtrala lingvo nenion mallaŭdindan aŭ kontraŭan al katolika kredinstruo.

Kompreneble, abato Peltier, estis ĉarmita per tiu ĉi favoro de la katolika ĉefekleziestro. Li publike dankis ¹⁾ en la nomo de redakcio kaj de ĉiuj siaj legantoj Lian Papan Moŝton. Alian apartan dankon sendis li al monsinjoro Giambene, prelato-esperantisto en Romo, per kies klopodoj la dirita grava akto por la katolika esperantistaro fariĝis fakto plenumita.

La Papa favoro al Esperanto, certe malgrandigis la nombron da ĝiaj kontraŭuloj, sed plimultigi la nombron da esperantistoj katolikaj en mallonga tempo nesukcesis. La afero iris per natura vojo, malrapide. Krom Papa beno estis bezona alia kondiĉo de sukceso — la energia homa laborado kaj uzado de konvenaj propagandaj rimedoj.

¹⁾ Legu E. K. 31. 1—4 p.

Por la celoj de esperantismo katolika la plej taŭga rimedo estis pli proksima konatiĝo kaj pli ofta konsiliĝo inter la diversnaciaj esperantistoj katolikaj. Tial, kiam en 1905 sukcesis organizi la unuan esperantistan kongreson en Boulogne-sur-mer, multaj katolikaj esperantistoj volonte ekdecidis tien veturi kaj en ĝi partopreni.

La nombro da konvenintoj estis sufiĉe granda. Dimanĉon, la 5 de Aŭgusto, okazis por ili katolika meso, dum kiu la unuan fojon estis kantita himno en Esperanto, komenciĝanta per vortoj:

„El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj
„Ni kunvenintaj Vin adoras Di” . . .

D-ro Zamenhof mem ĉeestis tiun ĉi unuan „esperantan” meson . . .

Vespere katolikaj esperantistoj faris sian kunvenon en lernejo de S. Stanislas, kies estro estis pastro-esperantisto Joncquet, aŭtoro de fama letero al pastroj rusaj. Abato Peltier havis belan paroladon pri universala frateco en Kristo, kaj legis historian raporton pri „Espero Katolika”, plendante pri ĝia bedaŭrinda financa stato kaj petante ke esperantistoj katolikaj mem decidu: ĉu E. K. devas vivi, aŭ morti”.

La kunveno katolika dum la unua esperantista kongreso montris al ĉiuj la utilecon de l’ komuna konsiliĝo. Tial oni decidis kolektiĝi ankaŭ la venontan 1906 dum la dua kongreso en Ĝenevo.

Tiu ĉi lasta okazis ĝuste post la solena Papa beno de E. K. La katolikaj kongresanoj sentis la devon esprimi al Pio X sian respektplenan dankon. Estis sendita konvena telegramo: unu al Lia Papa Moŝto, alia al S-ro Renou, ĉefepiskopo de Tours, kiu aprobis la agadon de abato Peltier.

Alia grava okazintaĵo en la Ĝeneva kongreso estis la oficiala permeso de tiea katolika episkopo por la prediko en Esperanto.

El aliaj speciale esperantaj aferoj estis priparolataj la demandoj pri pli sukcesa propagando de E. K., pri la ebligo al direktoro ricevi helpon de pagota sekretario. Abato Peltier konsilis precipe du rimedojn de propagando:

artikolojn en naciaj katolikaj ĵurnaloj por „Esperanto” kaj la varbadon de eminentuloj, de estroj katolikaj en diversaj fakoj de l' scienco.

Pastro Guinard raportis pri siaj penoj propagandi E. K. inter la hispanaj katolikoj.

La prediko en Esperanto de abato Peltier faris grandegan impreson sur la ĉeestintaro. La predikon sekvis bele kantita esperanta himno: „El ĉiuj landoj” ...

La kongresanoj katolikaj disiris tre fortikigitaj spirite.

Post la Ĝeneva kongreso tuj komenciĝas pli energia esperantista movado inter la katolikoj. La fama katolika ĵurnalo „La Croix” donas tre favoran noticon pri E. K. Oni tradukas en Esperanto kelkajn ekleziajn himnojn por la katolika diservo. Oni komencas zorgi por la eldono de katolika preĝareto. Ĉiuj katolikoj kapablaj kanti estis invitetaj dum la tria kongreso en Cambridge partopreni en la aranĝata katolika ĥoro. Unu el katolikaj pastroj movigis eĉ la demandon pri la organizo de Internacia Oficejo ĉe la Vatikano. Tiu ĉi oficejo uzante lingvon Esperanto povus laŭ aŭtoro de tiu ĉi projekto, faciligi la rilatojn de katolikoj nun en Romo kaj farus grandegan servon al la tutmonda katolikaro.

Abato Peltier siaflanke por la ĝenerala kunveno de katolikoj dum la tria preparis detalajn projektojn de tri novaj katolikaj organizacioj:

1. Projekton de kooperativa societo por la propagando de katolika vero per Esperanto, similan al angla societo de katolika vero,

2. Projekton de „Frataro de katolikaj esperantistaj pastroj”, havanta la celon unuigi la katolikajn pastrojn diversnaciajn por faciligi inter ili per Esperanto rilatojn pri pastraj sciencoj kaj ĉiuspecaj religiaj aferoj, kaj

3. Projekton de societo „La Abelso Esperantista” — aŭ amika unuiĝo de katolikaj komercistoj kaj industriistoj — por faciligi al ili la komercajn internaciajn rilatojn.

La tria esperantista kongreso havis grandegan sukceson. La katolikaj kongresanoj ricevis oficialan papan benon. Bedaŭrinde pro la malsano ne ĉeestis abato Peltier. En

ĝenerala kunveno estis nur legita lia letero, en kiu li sciigas pri la intencata fondo de sia Esperanta presejo.

La kongresanoj ekzameninte la projekton de abato Peltier pri la kooperativa societo — trovis ĝin ankoraŭ neoportuna. Anstataŭ ĝi laŭ projekto de P-ro Richardson estis fondita alia societo sub la nomo „Societo Katolika Internacia” (S. K. I.). Kontraŭe la projekton de „Pastra Esperantista Frataro” (P. E. F.) oni akceptis unuvoĉe.

Post la tria, la esperantista movado inter katolikoj despli grandiĝas. Multe laboradas belga grupo „Excelsior” tradukante en Esperanto diversajn katolikajn verkojn. En Irlando agadas tre fervora esperantisto P-ro Parker, en Francujo tre sukcese propagandas Esperanton inter katolikaj grupoj de junuloj S-ro Cl. Colas. En Ameriko „The catholic Home Jurnal” en St. Louis dediĉas multajn paĝojn al Esperanto, S-ro Ĉefeĉ fondas esperantistan grupon en la Insulo Madeira en tiea katolika seminario. En Chili sin organizas la grupo de „junularo katolika Chila” k. t. p.

Abato Peltier antaŭ la kvara presigas en E. K. serion da demandoj. La plej notindaj estas jenaj:

„Kion vi pensas pri la projekto de Internacia Kongreso de katolika agado en 1910 per rimedo de Esperanto,

„Kion vi pensas pri la kreo de Pastra komitato por eldoni en Esperanto la Novan Testamenton kun katolika komentario.

„Kiamaniere agadi por kunigi kaj interrilatigi la katolikajn komercistojn kaj industriistojn, k. t. p.

La prezidantecon de ĝenerala katolika kunveno akceptos kanoniko Pichot, prezidanto de Instituto de Paco en Monaco.

La programo de tiu ĉi kunveno dum la kvara en Dresden, krom la predikoj kaj kantoj en Esperanto en la preĝejo enhavis ankaŭ la demandon pri la aldono al E. K. dediĉita al specialaj teologiaj, filozofiaj kaj bibliaj demandoj, pri la adreslibro de ĉiuj katolikaj pastroj esperantistaj kaj pri pli taŭga organizado de S. K. I., de P. E. F. kaj de „Abelo Esperantista”.

La kvara, malgraŭ la kontraŭa agado de idistoj, havis ankaŭ sukceson. Ĉiuj ekvidis la neceson de pli energia

agado por la fina sukceso. La ĉefo de katolikaj esperantistoj, sentante la alproksimiĝantan morton, rapidas organizi la redakcian komitaton de E. K. kaj al ĝi transdonas sian revuon. Nova komitato resumas la celon de tiu ĉi revuo per tri vortoj: „Espero Katolika estos gazeto 1^o. Katolika, 2^o. esperantista, 3^o. agada“. Kaj plenumante tiun promeson ĝi tuj anoncis la daton de la kvina en Barcelono kaj komencis igadi la katolikojn multnombre en ĝi partopreni. Bedaŭrinde la 17 de Februaro 1909 mortas en Lourdes abato Peltier. Doloro pro tiu grava perdo estis sentata de tuta katolika esperantistaro. Unutempe la esperantista movado ŝajnis kvazaŭ haltiĝinta inter la katolikoj. Sed kompreneble tio ĉi estis nur ŝajno. Tro grandiĝinta ja estis tiu ĉi movado, por ke ĝi povu ĉesi aŭ pere. La lokon forlasitan de abato Peltier rapidas okupi novaj junaj fortoj, inter kiuj precipe memorinda estas Cl. Colas. Li ne sole lerte daŭradis redaktadon de E. K., sed fondis eĉ novan katolikan Esperantan organizacion sub la nomo „Katolika Esperantista Oficejo“. Jen per siaj leteroj, jen per sia revuo li energie agadas por altiri pli multe da katolikaj esperantistoj al Barcelona Kongreso. Malgraŭ malfavoraj politikaj cirkonstancoj la kvina sukcesas kaj la katolika grupo de esperantistoj aperis nemalgranda.

El decidoj de Barcelona kunveno la plej grava estis la jesa solvo de la demando pri la utilo kaj neceso kunvoki en Parizo dum la printempo de 1910 la unuan kongreson de katolikoj esperantistaj.

Tiu ĉi decido, kiel vi scias, estis siatempe efektivigita. La Katolika Unua havis ankaŭ nemalgrandan sukceson. En ĝi interalie estis decidita, ke similaj katolikaj internaciaj kongresoj fariĝu periodaj. Pri ili mi eble havas la honoron paroli alian fojon.

Tie ĉi mi nur notos, ke dank' al tiuj kongresoj la esperantista movado inter katolikoj estis fortike puŝita antaŭen. La ideo de internaciismo katolika tre rapide komencas progresadi. La katolikoj pli kaj pli klare ekkomprenadas la strangecon kaj nenormalecon de siaj reciprokaj rilatoj. Havante ja komunan kredon, la saman patron en la esti-

minda persono de Roma papo kaj konfesante sian komunan fratecon en Kristo, ili tamen ne povis ĝis nun unu alian kompreni. Tiu ĉi fakto fariĝis plu netolerebla. Kaj la katolika idealo fariĝas pli kaj pli klara: Krom la internacia lingvo latina — por la Eklezio instruanta, ili deziras ankaŭ havi alian internacian lingvon por la *eklezio instruata* — kaj tiu ĉi dua, nova lingvo internacia ne povas esti ia alia ol nia kara Esperanto. Donu Di' ke tio ĉi efektiviĝu la plej baldaŭ.

P-ro A. DOMBROVSKI.

Aldono de la redakcio:

Por kompletigi supran historiajn detalojn pri nia movado, la nuna redakcio de E. K. devas aldoni, ke P-ro DOMBROVSKI mem estas unu el la unuaj Esperantistoj, ke li ĉiam fervore laboris por nia afero kaj por nia katolika movado kaj por nia kara revuo E. K., por kiu li verkis belajn kaj gravajn artikolojn. Ni represas la unuan paĝon de la unua numero de „Espero Katolika“, kiu estas ornamita per tiu ĉi bela poeziaĵo:

**AL LIA PLEJ SANKTA MOŜTO
PAPO PIO X-a.**

Ĉesis jam viva malgajo publika
Dio ĝojigis la Kristeklezion:
Sur trono Petra la mond' katolika
Salutas Pion.

Grincu per dentoj infera serpento!
Nin ne timigas jam via envio:
Tra l' maraj ondoj kaj forta la vento
Nin gvidos Pio!...

Oni diradu, ke Petra la Ŝtono
Jam detruigas, fariĝas nenio...
Granda mensogo! Jen sankta la trono
Kaj sur ĝi Pio!...

Tial laboru sen tim' kristanaro
 Ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio:
 Unu paŝtisto kaj unu ŝafaro...
 Vidu ĝin Pio!...

18 - IX - 03.

P. A. DOMBROVSKI.

(El *Espero Katolika*. No. 1, Oktobro 1903, paĝ. 1.)

Ekskursoj kaj Pilgrima Vizito al la Sanktaj Lokoj de l' Eterna Urbo. ¹⁾

Pri la „Eterna Romo” skribi oni petis al mi, mi la simpla proza hometo el la neĝkovrita montaro de l' Svislando, mi la ŝtona postulanto de iu ferma kaj ne senorde ŝanĝebla regularo, mi, la ligne pensanta kaj jam alimaniere sufiĉe okupita Juristo en mezo de tiel multnombra filozofa sciencularo, kiuj pli bone povus trovi la ĝustan vorton por pentradi per kuraĝegaj strekoj la belaĵojn kaj mirindaĵojn ĉiujn, pri kiuj la plej lertaj poetoj de l' mondo jam tiel mirege kantis. Estas preskaŭ ironio de l' sorto kaj ironio despli rimarkinda, ju pli eĉ la plej fama kaj mondkonata poeto de l' germana lingvo, GOETHE, kiam li verkis siajn memorfoliojn pri Romo, en infana modesteco konfesis: „ne estas eble, skribi pri la eterna urbo ankaŭ nur unu linion, kiu estus inda je ĝi, el vidpunkto de la grandaj historiaj faktoj, kiuj en la daŭro de pasintaj jarmiloj por la histo-

¹⁾ Mi tiu-ĉi-loke dankas D-ron LEHNER, ke li konsentis esti la raportisto de niaj ekskursoj. Li faris sian taskon bonhumore, ofte laŭ sprita kaj humorista maniero. Mi do opinias, ke ĝi plaĉos al niaj legantoj, kvankam la stilo ne estas ĉiam la internacia Esperanta stilo kaj la frazkonstruo estas ofte iom tro komplikita. Por korekti kaj ŝanĝi tiujn du aferojn en la manuskripto, mankis al mi la tempo, ĉar mi ricevis ĝin en la lasta momento; kaj mi ne volonte prokrastus la raporton pri niaj ekskursoj. Pro tio la legantoj senkulpigu nin kaj konsideru nian bonvolecon. (Noto de la Redakcio.)

riulo sin aliĝis al ĉi tiu sankta lulejo de l' Eŭropa vivo kaj kulturo."

Sed ĝuste mi nun estas kiel ĉiam, ankaŭ en ĉi tiu momento denove la mizerindulo, kiu estas kondamnita, sin prezenti al mokaj ŝercoj de saĝaj legantoj, mi, kiu ĝuste en lastaj tagoj, kiam mi devus komenci ĉi tiun raporton, tute forgeseme, per Fraŭlino en Germanujo, irinta al anti-alkohola kongreso Milanon, resendis al mia frato en Italujo la gvidlibron, en kiun dum nia restado en Romo mi faris diversajn notojn kaj memorsignojn. Estas tial, ke nun, en lasta momento permesita por ĉi tiu glora raporto, mi tute sen ia helpilo kaj nur fidante mian butonitan kapon kaj la duonan dekduon da gvidvortoj en mia notlibreto, mi devige skribas preskaŭ parkere senhalte pri la „Eterna Romo" kaj ĝiaj monumentaĵoj. Kaj kial mi scias, ke multfoje jam senpensa babilado enhavis unu aŭ l' alian bonan ideon, kaj ofte jam estis pli favore akceptita la bona intenco, ol la rilate malpli bona verko, pro tio ankaŭ en obeema sento kaj modesta ĉirkaŭumo la hodiaŭan vesperon liberan mi pasigas, klopodegante plenumi laŭ povo kaj permeso de l' nuna forflugema momento mian devon ŝuldan al la amikaro de l' Roma kongreso, per repenso kaj repensigo en kelkaj rimarkoj laŭ nia tagordo pri la pilgrima vizito de la papurbaj lokoj, kiuj interesas ĉiun kristanon, kaj katolikon kaj kulturamikon.

Plenigonte do tiamaniere la jam al mi fiksitajn paĝojn de nia gazeto kun ĝiaj sufiĉe malmultaj abonantoj,¹⁾ mi sentas samtempe treege la maleblecon, fari uzon de iuj bildoj, kiuj povus helpigi la legadon de miaj repensigoj. Ŝajnas pro tio, je la vidpunkto de la al mi speciale komisiita tasko, nur unu, la jam nomita, vojo *irebla*, se ne tute senfrukte estu la legado de senenhavaj diraĵoj, kaj nur unu *irinda*, por ankaŭ nur iomete kontentigi la esperantajn

¹⁾ Esperante, ke D-ro Lehner dum kelkaj numeroj de E. K. daŭrigos sian interesan raporton, mi samtempe esperas, ke li poste povos konstati, ke ĉiuj legantoj de E. K. intertempe varbis tiom da abonantoj, ke *la fino* de lia raporto estas legata de *sufiĉe multaj* abonantoj. (Noto de la Redakcio).

rememordezirulojn t. e. la akurata unutona spirita reprodukto de la faritaj ekskursoj, tago post tago, paŝo post paŝo. La pacienco de la legontaro eble despli povas atendi, ju malpli mi trovos okazon, dirin ion pri laborkunvenoj.

Romo, la 4-an de Septembro 1913 (Jaŭdo):

S. Maria Maggiore („La plej granda preĝejo dediĉita al Maria, patrino de Jesuo”) — S. Pietro in vincoli („S. Petro en ĉenoj”) — Colloseum („elparolu: Koloseo”).

Ne estis la „Porta del Popolo” (Pordego de la popolo), kiu al ni malfermis la eternan urbon, kiel en tempoj pli fruaj kaj ne ankoraŭ konintaj fervojojn, kaj ankoraŭ ne estis S. Pietro (Preĝejo de S. Petro), la Ĉefpreĝejo de Romo kaj de l' mondo, monumento kvazaŭ farita por la daŭro de eternaj tempoj, kiu estas kaj restos la unua viddeziro de ĉiu Roma'n pilgrimanta katolikaro, kaj kies grandeco estus povinta vidigi al ni, jam en la unuaj momentoj, la tutan centron de eksteraj simboloj de la vere internacie kaj tutmondinde konstruita katolika penso. Anstataŭ tio, la unuaj paŝoj en Romo nin kondukis tra la Piazza Barberini kaj la „via delle quattro fontane” al la „Piazza del Esquilino”, kie bonege estas lokita la „Chiesa di S. Maria Maggiore”, la kvara Patriarĥa Basiliko kaj unu el la plej interesaj preĝejoj de Romo, dankanta sian ekzistadon al miraklo simila al tiu okazinta en 1826 al Franco Migné, al kiu aperis grandega kruco al ĉielo. En Romo, nome en la nokto de la 4-a—5-a de Aŭgusto de l' jaro 352, la Papo S. LIBERIUS kaj riĉa urbana privatulo Johannes Patricius vidis samtempe la saman aperaĵon t. e. la sanktan virgulinon, kiu ordonis al ili, konstrui templon en la loko, kie ili estus vidontaj freŝan neĝon. Fakte la sekvintan tagon matene ili vidis laŭ la rakonto historia ĉi tiun miraklon en mezo de la somero, kie nur tre malofte eĉ dum vintro oni vidas neĝon kaj kie ni ankoraŭ en la unuaj semajnoj de Septembro 1913 tiom ŝvitis kaj kaŭze de varmego suferis, neĝon sur la monteto de „Eskvilino”. La Papo mem faris la plandeseĝojn de la konstruota preĝejo en la „Aŭgustan neĝon” kaj la riĉulo pagis la elspezojn. Laŭ la nomo de

la konstruanta Papo la preĝejo unue estis nomita „Basilika Liberiana”. Kiam la Papo SIXTUS la III-a en la jaro 432 renovigis la basilikon, ĝi estis nomita: „Sancta Maria ad nives” (S. M. ĉe l’ neĝo) kaj datas de ĉi tiu tempo la ankoraŭ hodiaŭ en katolikaj rondoj regule tenita memorfesto. Pli malfrue oni kreis la nomon: „Sancta Maria Maggiore (t. e. la plej granda)”, ĉar ĝi estas la plej granda el ĉiuj 26 preĝejoj dediĉitaj en Romo al la patrino de l’ Savinto. La interno ricevis de l’ Papo Benedictus la XIV-a du seriojn da kolonoj, la pli malsupra de la jonika, la pli supra de la dorika stilo. Ĉi tiuj kolonoj el blanka marmoro dividas la tutan placon en tri partojn, kies meza estas la plej lumigita. Oni kredas, ke la kolonoj estas prenitaj el la tiama templo de la romana pagana diino Juno. La mosaika laboro el la 7-a jarcento, signifante diversajn bildojn de Kristnasko kaj epizodojn el la tempo de la Apostoloj, reprezentas grandan arton kaj monvaloron. La plafonon de la meza „Ŝipo” Alekzandro la VI-a en la jaro 1500 orumigis per la unua oro, kiu estis portita el Ameriko kaj parte ankaŭ el Hindujo. Cetere ĉiuj samtempe memoros pri la bela portreto de la Virgulino sur la altaro en mezo de la „Confessio”, pentrita de „Sanluca” (elp. „Sanluka”), almetita sur fondo de Lapislazzuli kaj ĉirkaŭaĵo de multvaloraj ŝtonoj, la tuto portita de kvar anĝeloj el bronco orumita. En formo de reliefo, ankaŭ tute el bronco orumita, estas vidindega la desegno de la miraklo de la neĝo, kaŭziginta la konstruon de ĉi tiu Diodomo. Ambaŭflanke sin trovas la kapeloj de l’ Papoj Paŭlo la IV-a kaj Siksto la V-a. La lastnomita estas unu el la, en Romo, hodiaŭ ĉe la popolo plej konitaj Papoj de l’ historio. Tial la Romanoj tiel estimas respektive la posedon de lia tombejo kaj pro ĝi samtempe ĉi tiun preĝejon. La Obelisko ĉe la S. Petroplaco, ĉirkaŭ kiu sin teksis tiom da rakontetoj kaj pri kiu pli poste ni speciale parolos, estas egalmaniere de li alportita kaj starigita. Ĉi tie nur tiom ni koncedas da loko al la multaj rakontaĵoj pri Siksto la V-a, kiom nepre postulas la bezono, por ne tute silente preterpasi la memoron de ĉi tiu eklezia kaj princa grandulo. Estis en Italujo jam je liaj vivtempoj

multa popolaĉo, rabistoj kaj bandistoj, kiuj ne havis ian senton por ordo kaj regula laboro kaj vivo, sed plie maltrankviligis sian ĉirkaŭaĵon kaj malebligis la kvietan evoluon de regnana bonfarto. La policanaro — kiel ankoraŭ hodiaŭ diversfoje kaj diversmaniere okazas — jam tiam ne sukcesis, malhelpigi la praktikojn de la kanajlaro. Tial li decidis, sin mem en propra persono maske vestita altrudi al la bandistoj por 8 tagoj, por tiamaniere sciigi pri la kaŝejoj kaj embuskoj plej danĝeraj. Laŭ la tradicio li nun tiel bonege sukcesis, ke jam post kvin tagoj li estis gajninta la ludon kaj reiris kun la jam duone akirita venko kontraŭ la malbonuloj. Estis ĉi tio laŭta senvorta riproĉo por la policanaro tiutempa.

Alifoje, kiel oni rakontas, li iris maskita iun vesperon je malfrua horo ĉe multplendita malbenantema trinkejmastero Z. — tute proksime de la „Piazza Barberini” kaj de nia estinta loĝejo — por sin konvinki mem pri la vereco de la rilataj plendoj. Estinte alveninta en la trinkejaĉo, li prenis seĝon flanke de iu trinkulo kaj mendis diversajn kvinonojn da vino unu post la alia, por kolerigi tiamaniere la kartludantan mastron. Fine ĉi tiu lasta sin sentis tiel multfoje ĝenita ĉe lia ludo, ke li pensis kaj eĉ sufiĉe laŭte sin plendis, malbenegadante treege kontraŭ la gasto, kial tiu mendis ne unu aŭ du litrojn kune, sed anstataŭe nur ĉiam kvinonon. La gasto ne diris ion, sed foriris silente. Tamen la konsekvencoj ne forrestis por la malsaĝa malbeninta mastro. Kiam li ekvekiĝis la postvenintan matenon tute frue, li aŭdis batojn de marteloj antaŭ sia domo, kie oni estis jam konstruinta pendigilon el ligno kaj al demando, kion signifus la martelbatoj, li recevis de la laborintoj la respondon, ke laŭ ordono de l' Papo, de li la vesperon antaŭe tiel malbenita, oni jam estis komencinta konstrui la pendigilon por la malbenantemulo de l' urbo.

Mi nun tute ne kredas ĉiujn epizodojn, kiujn oni rakontas en Romo per popola buŝo pri la antikvaj kaj mezjarcentaj tempoj de Roma laika aŭ klerika historio, sed unu ŝajnas al mi certa, ke tiaj rakontoj plej laŭte diras al ni, kiel la rilataj eminentuloj sin okupis pri la regnado de l' tiama

popolo kaj kiel ankoraŭ hodiaŭ paro da Romanoj taksas la ordosenton kaj ordobezonon de Siksto la V-a. Ĉu vi nun ne kredas, kion mi diris plisupre, ke la Romanoj ankoraŭ en niaj tagoj ricevas „respekton” jam de la nomo mem de la longtempe mortinta Papo?

Sed, preskaŭ troon nun mi flanken paroladetis. Ĉar ankoraŭ ni estas en la Preĝejo de S. Maria Maggiore kaj la ĉiuloke samkarakteraj veturilistoj nepacience nin atendas ekstere, por konduki nin al S. Pietro in Vincoli. Bone, ke tri ĉiam malfermitaj pordegoj nin invitas foriri post la regula pilgrima preĝo. Kvara pordego nur okaze de Jubileoj papaj kaj ekleziaj malfermiĝas por mallonga tempo, kie ĝis 1871 la papoj benis „urbem et orbem” (la urbon kaj la tutmondon) starante ĉe ĉi tiu pordo, la unuan fojon post la elekto. Kvina pordo nur al fremdulo ŝajnas ekzisti, fakte nur estas signo de pordo, kaŭze la harmonio de l' stilo de l' konstruinto uzata kiel blinda stililo. Fine la foririntulo rimarkas la kvadratforman sonorilejon de l' turo (1376) super la mezo de la preĝejo kun parte ogivaj kaj parte rondaj fenestroj. Oni diras, ke ĝi estas la plej alta ripozejo de sonoriloj. Ĉu ĉiuj ĝin vidis? Iomete karakterizas la gvidmanieron de niaj gvidantoj, ke ni foriris la saman pordon, tra kiu ni estis irintaj. Aŭ ĉiuj scias, ke S. Maria Maggiore havas du fasadojn, unu suden kaj la alia norden, la ĉeffasadon tute direkte kontraŭmetita al la „Trinità dei monti”, kun la grandioza super- kaj ĉirkaŭrigardo de unu el la plej belaj placoj de l' urbo, kaj aliflanke la travertinfasado. Ĉe la lasta ni estis alvenintaj kaj foririntaj. Ĝis revido!

Per la „Via Merulana”, mallarĝa kaj maldekstre je alta muro flankigita, laŭlonge la malnova pordego de S. Praxede, okcidenten kaj preskaŭ la „via dei zingari” (vojo de la ciganoj) kruciginte, ni trapasis S. Martino al Monti (S. Martino ĉe la montoj) preĝejo tute proksime ĉe la „termi di Trajano” (Banejoj de Trajano), konstruita en la jaro 500 je honoro de S. Martino el Tours de iu Symmachus, kie jam Silvestro (314—335) en la domo de Equitius starigis preĝdomon. En la jaro 1650 okazis renoviĝo kun bri-

lego. De ĉi tie nur mallonga vojeto de S. Pietro en Vincoli, paralelstrato de „via S. Lucia”, nin invitis al vizito de la samnoma preĝejo „S. Pietro in Vincoli” (S. Petro en ĉenoj). Ĝi estas konstruita jam 442 de la imperiestrino Eudoxia (elparolu: Eŭdokzia) kaj de ŝi ankaŭ donacita kun la ĉenoj, per kiuj siatempe S. Petro estis enkatenita. Jen la kialo de la nomo de la preĝejo. „La Petraĵ Ĉenoj” estas konservataj en la sakristio. Kopioj de la katenoj en formo de poŝhorarkatenoj, portataj multfoje de pastroj — estas aĉeteblaj samloke, se mi ne eraras, je 0,4 Sm. En la jaroj 556, 681, 780 oni regule ŝanĝis la stilon de diversaj partoj de ĉi tiu preĝejo. Plibeligita ĝi estis speciale en la jaro 1476 de Sikstus la IV-a kaj dum la jaroj 1503 ĝis 1513 de Julius la II-a. Estis sub la regno de Julius II, kiam li fariĝis kardinalo, ke li konstruigis „Sangallo”, la, ankoraŭ hodiaŭ loĝatan, monaĥejon, kie troviĝas nun ankaŭ la fizika-hemia fakparto de l’ universitato. Kaŭze de la diversaj supre nomitaj renovigoj kaj stiloj, ĝi taŭgas por tio plej bone; kiel nura monumenta domo ĝi nur sentigus malbonan guston al la vizitanto. Dorikaj kaj jonikaj kolonoj estas kiel eble plej malbone lokitaj. Cetere estas tamen vere, ke oni serĉis multmaniere altirigi la pilgrimantojn, unue per la arta kaj bongusta, grandioza kaj multvalora tombejo de Julius la II-a, farita de Michel Angelo kaj komence destinita por „S. Pietro”, kie nun sin trovas la „Pietà”. Pli poste pro troa laboro de l’ majstro ĝi estis plimalaltigita de l’ „Mausoleo” al la nura murdekoraĵo. Tial, nur la tri malsupraj statuoj, restis tute la verko de grandulo inter la skulptistoj de la mondo. En mezo Moses, la plej kuraĝega kreaĵo de moderna arto, reprezentante la plej potencan afekcionon, la vire sed pene venkitan koleron pri la malsaĝeco de l’ popolamaso adorinta la oran bovidon. Per la dekstra mano li ŝirmas la malestimitan leĝtabulon kaj prenas samtempe la hararon de sia barbo, kiu simile al marondoj ondegas super liajn genuojn. La maldekstra mano, premita kontraŭ lia korpo, signifas la preskaŭ ne devigitan ripozon. Ĉi tiu kapo ekscitita, forta, tiel malgranda kaj tamen tiel energia, ĉi tiu lingvo laŭta en la

tuta muskolaro, la vejno ĉe la kolo, la vestaĵo ĉirkaŭ la fama dekstra genuo, ĉio tio estas antaŭsentita korpigo de la nova forta popola vivo kaj sento kaj kredo de l' komencanta tempo. „Moses” signifas ankaŭ ion el la ideala penso de la granda Papo Julius la II-a. Bedaŭrinde nur estas, ke „Moses” ne trovis la ĝustan lokon kaj senvole oni pensas al la Dia malpermeso, kiun Moses ricevis tiam de l' Sinjoro, li nur devis esperi, iam vidi la „laŭdatan landon”, sed eniri en ĝin ne estis permesata al li. Tial li estas en „Pietro en Vincoli” anstataŭ en „S. Pietro” ĉe l' Vatikano.

Tute proksime de ĉi tiu sanktejo — jen la miraklo por la fremduloj en Romo, ke ĉiuj monumentoj tiel multnombraj kaj tiel diferencaj estas preskaŭ unu tute flanka al alia, sen ke oni povus vidi la unu estante ĉe la alia, unu kaŝanta la alian — troviĝas, nur per la „Via pulveriera” (Vojo de polvo”, kvazaŭ se alie, ekzemple sur la Via Appia ne sin trovus polvo!) interspacita, la plej granda profana monumento de l' antikva mondo, la monstra amfiteatro de l' antikvaj Romanoj. Ĉi tiuj muroj, ĉi tiuj ŝtonoj, kiom ili povus diri ĉe l' lumo de l' luno kaj ĉe l' bruego de bestoj. Ĉi tiu multfoje jam estinte eĉ besta scenejo de senanimaj, iom post iom krueligintaj imperiestroj el la plej malhelaj tempoj de la brila kaj ĉiopova regno de l' tiama mondo. Jen, kion diris la germana Goethe pri l' koloseo (la vorto signifas laŭ germana lingvo ekstraordinare grandan konstruaĵon): „Nun, vidinte la Koloseum, mi komencis ĝojiĝi pri la Romaj monumentoj. Historio, enskriboj, antikvaj moneroj, ĉio aĵoj, pri kiuj antaŭe mi tute ne interesiĝis, renkontas min nun vivaj kaj salutas min. Kio okazis al mi en la naturscienco, tio nun ankaŭ ĉi tie, ĉar estas ĉi tie, kie aliĝas la tuta historio kaj mi sentas hodiaŭ la duan naskiĝtagon, veran renaskiĝon”.

Kaj vere kaj efektive estas ĝi silenta kaj samtempe la plej vortriĉa monumento de Roma grandeco estinta kaj Roma karaktero dum la flortempo de l' imperiestraro. Por gladiatoraj ludoj kaj luktoj kun sovaĝaj bestoj, kreita je mire laŭcelaj konstruoj, ĝi superis ĉiun similaĵon kaj ĉi

tiu fakarto efikis la plej multe antaŭ la mondregnestro kaj antaŭ la popolo, kiu adoris la forton, kiu sin mezuris ĉe sangaj ludoj kaj vivdanĝeroj. La gladiatoraj ludoj nome estis la anstataŭantoj de la popolkunvenoj de la respublikaj tempoj, kun tasko, konservi zorgeme la bonan humoron de l' popolo. Estas pro tio tre karakteriza, ke eĉ la ŝparema Vespaziano konstruigis ĉi tiun plej grandan amfiteatron de l' Roma regno, kaj ke la bonula Titus (80 post K.n.) ĝin enaŭguris. Laŭ ĉi tiuj ambaŭ imperiestroj oni kreis la nomon „Flava amfiteatro”. La nomo „Koloseo” datas nur el la 8-a jarcento. Pri dek aliaj nomoj estas disputo inter la lingvistoj koncerne la kialon de ĝuste tia aŭ tia nomado. La hodiaŭa vizitanto vidas pli ol la duonon de la tiama Travertinkonstruaĵo — eĉ en ruina formo ankoraŭ de grandioza efiko. La elipsa ekstera flanko havas ankoraŭ altecon de $48\frac{1}{2}$ metroj, akson 188 metrojn longan kaj 156 metrojn larĝan. Elipso de 524 metrojn ĉirkaŭuma mezuro. 80 arkpordegoj enirigas pli ol 80.000 personojn en malpli ol duona horo. La seĝoj, nun senigitaj de la iama marmora vestaĵo, estis tute apartigitaj, ĉiu ŝtupo malantaŭen havis malgrandajn apogilojn, kiuj ebligis al la plisupresidiĝantoj surmeti agrable ilian piedojn sur ili. Ĉiuj 87.000 seĝoj vidiĝis al la ĉeestinto tute direkte la tutan scenejon. La seĝserioj formis ovorondajn elipsformojn, komencantajn sube ĉe la areno ĝis la murkapitelo, kie ankoraŭ estas videblaj hakiloj por ebligi la pendigon de akvopenetreblaj drapegoj.

La rangordo de la seĝoj estis tia, ke unu prezentiĝis disigita de l' alia. Plej sube la imperiestraj seĝoj, nur 5 metrojn altigitaj de l' planko de l' areno, kontraŭ iuj ajn atencoj de malamikoj aŭ bestoj ŝirmitaj de 5 metrojn alta remparo. Ĉi tie sidiĝis ankaŭ la sinjorinoj de la imperiestra familio kaj la akompanantaro. Apude sur honorseĝoj la Senatoroj en festa ornato, la Vestalinoj, okaze ankaŭ fremdaj reĝoj kaj la ambasadoroj. Poste sekvis la seĝoj por la kavaliroj kaj iliaj familioj, malantaŭ ĉi tiuj la regnantoj liberaj en blanka togo (simbolo de libereco). La tria kaj lasta etaĝo (summa cavea) estis disigita de la malplialta seĝaro denove per 5 metrojn alta muro (nomita:

Balten), havis pli krutajn ŝtuparojn kaj ebligis la eniron al la ĝenerala ne rekte sklavigita popolo. La plej lastaj seĝoj de l' plej supra etaĝo, kovrita de veltoloj estis je dispozicio de la sinjorinoj, servitaj de sklavoĵoj. Laŭ la rilata stato de l' suno la veltoloj povis esti forprenitaj aŭ tute etendigitaj super la tutan Koloseon. La „Arena” estis farita per bretara planko, ripozinta sur larĝaj muroj. La pli subenejo formiĝis el diversaj apartigoj, kiuj servis parte kiel maŝinejo, „Naumaĥejo”, akvujo kaj parte kiel kaĝoj por la sovaĝaj bestoj furiozaj. Estas vere nur domaĝe, ke ĉe nia ĉeestado mankis la lunlumo necesa por revii pri antikvaj pasintaj kaj ne plu revenontaj tempoj kun iliaj apartaj ĝojoj kaj doloroj, fortoj kaj malfortoj, espero kaj malespero.

D-ro LEHNER,
St. Gallen (Svisujo).

Daŭrigota.

Oficialaj Sciigoj.

Al la I. K. U. E.-anoj.

„Nia Kvara” en Romo komisiis al ni verki projekton de Regularo de I.K.U.E., por esti diskutota kaj akceptota de „Nia Kvina” en Lourdes. La kongreso aprobis, ke ni povos aligi al ni helpantojn en tiu afero.

Ni eksciis, ke P-ro Poell estas unu el la personoj, al kiuj „Nia Tria” en Budapest petis, verki projekton de regularo de I.K.U.E., kaj ke li dum tiu ĉi jaro, interkonsiligante kun aliaj, elverkis bonan projekton, kiu povos esti la objekto de antaŭdiskutoj en nia organo „Espero Katolika”.

Ni do akceptas la helpon de P-ro Poell, kaj petas lin, publikigi kiel eble plej baldaŭ lian projekton en E. K., por ke ĉiuj I.K.U.E.-anoj havu okazon, diri sian opinion pri ĝi. Tiel la demando de Regularo de I.K.U.E. bone estos

preparita antaŭ „Nia Kvina”, en kiu oni povos fiksi kaj aprobi la definitivan tekston kaj akcepti ĝin kiel Oficialan Regularon de I.K.U.E.

La Prezidanto de I.K.U.E.,

Patrick PARKER.

La Ĝenerala Sekretario de I.K.U.E.

Jakobo BIANCHINI.

(dato) La 6-an de Oktobro 1913.

Por plej baldaŭ plenumi la supre esprimitan deziron de nia ŝatata Prezidanto kaj Sekretario, mi jam en tiu-ĉi numero de E. K. publikigas mian Regular-projekton. Ĝi estis jam verkita antaŭ „Nia Kvara”, sed la subita morto de Pastro Richardson malhelpis la transsendon al li. Do nun, laŭ volo de nia Estraro, mi prezentas la projekton al la interesiĝantoj.

Statut-projekto pri la

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.).

I. **Nomo kaj sidejo.** Je la unua de Aprilo 1910 estas fondita en Pariso la internacia ligo de Katolikaj Esperantistoj nomita „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista”.

La sidejo de I.K.U.E. estas la urbo, kiun loĝas la sekretario ĝenerala.

II. **Celo.** La celo de I.K.U.E. estas per Esperanto kiel eble plej efike servi la interesojn de l' Katolikismo.

III. **Rimedo.** Por atingi tiun-ĉi celon, I.K.U.E. uzas ĉiujn honestajn rimedojn, precipe:

starigi naciajn aŭ regionajn katolikajn esperantistajn ligojn en diversaj landoj;

okazigi kongresojn, por preparoli katolikajn interesojn;

fari enketojn pri diversaj movadoj, demandoj, k.t.p., kiuj interesas la Katolikismon;

eldoni revuojn, librojn, kaj aliajn presaĵojn;

fondi informejojn en ĉiuj landoj.

IV. **Monridemoj.** La aliĝinta ligo pagas minimume 10 spesdekojn jare po membro. Aliaj monrimedoj konsistas el gajnoj de vendaĵoj, donacoj, k.t.p.

La kotiza jaro komencas la 1-an de Januaro kaj finiĝas la 31-an de Decembro laŭ la Gregoria kalendaro.

V. **Espero Katolika** estas la oficiala organo de I.K.U.E.

VI. Anoj de I.K.U.E. estas nur Katolikaj Esperantistaj Ligoj, kies regularon aprobis la Estraro de I.K.U.E. kaj kiuj, per speciala komisiono kunlaborante por efektiviĝi la celon de I.K.U.E., pagis kotizon difinitan en Art. IV.

Ligo aliĝonta devas havi minimume 20 membrojn.

En landoj, kie ne ekzistas ligo, estos starigataj korespondantoj el la abonantaro de E. K.

VII. **Estraro.** El la prezidantoj de la specialaj komisionoj kaj el unu reprezentanto de tiuj komisionoj konsistas la internacia komitato. Tiu komitato elektas el siaj membroj prezidanton, ĝeneralan sekretarion, kaj laŭbezzone kasiston, kiuj kune konsistigos la ĉef-estraron.

La membroj de la ĉef-estraro renoviĝos post ĉiu periodo de tri jaroj, sed la ĝenerala sekretario konservos siajn funkciojn dum kvin jaroj.

La estrarmembroj estos elektataj dum la ĝenerala kunveno de I.K.U.E. Ĉiuj estas reelekteblaj.

VIII. **Ĝenerala kunveno.** La ĝenerala kunveno de la internacia komitato okazos dum la internacia katolika kongreso de esperantistoj, aŭ en kia ajn favora cirkonstanco, laŭ decido de l' ĉef-estraro, supoze ke en iu jaro ne okazus internacia katolika kongreso.

La membroj de la internacia komitato rajtos voĉdoni pri internaj aferoj por tiom da voĉoj, kiom ili reprezentas po 100 aŭ po parto de 100 membroj almenaŭ deksesjaraj kaj pagintaj sian kotizaĵon; sub la jena rezervo, ke neniu membro donis pli ol dek voĉojn. Pri ne-internaj aferoj oni voĉdonos po nacio.

La decidoj estas valoraj post jeso de la plimulto de la voĉdonantoj.

Ĉiu internacia komitatano, kiu ne eblas partopreni la kongreson povos, kun permeso de sia nacia komisiono, transdoni siajn rajtojn al unu el siaj kunkomitatanoj.

IX. Krom tiu-ĉi Fundamenta Leĝo ekzistas „detalara Regularo”, kiu aranĝos ĉion, kio devas esti difinita por

bone funkciigi la I.K.U.E. En tiu Detalara Regularo nenia precizigo kontraŭstaru al tiu-ĉi statuto fundamenta.

X. **Ŝanĝoj en la Statuto.** La statuto estas ŝanĝebla post la propono de la ĉefestraro, aŭ de iu ajn membro de la internacia komitato rajtigita de la $\frac{2}{3}$ de la plenaĝaj membroj de sia nacia komisiono, pagintaj sian kotizaĵon.

Tiu propono devas esti sendita al la ĉefestraro tri monatojn antaŭ la ĝenerala kunveno de I.K.U.E.

La voĉdono estas nur plenvalora, se la voĉdonintoj reprezentas la $\frac{2}{3}$ de la plenaĝaj membroj pagintaj sian kotizaĵon.

XI. **Ĉesigo de la Unuiĝo.** La ĉesigo efektiviĝos en la kondiĉoj de la antaŭa paragrafo.

Okaze de interkonsentita aŭ devigita ĉesigo, la ĉefestraro plenumas la likvidon kaj la disdonon de la posedaĵoj.

Rimarkoj pri la Regular-projekto.

Jen do projekto, pri kiu la legantoj de E. K., la stariĝontoj de forta Katolika Ligo, povos pridiskuti en la sekvontaj numeroj de nia ŝatata periodiko; ankoraŭ naŭ monatojn ni havas antaŭ Nia Kvina, sufiĉe da tempo por bonege sciiĝi pri ĉiuj opinioj.

Unu el la ĉefpunktoj, je mia vido, estas la stariĝo de naciaj aŭ regionaj grupoj aŭ ligoj. La unua demando de kelkaj interesiĝantoj estos: ĉu ĉie naciaj ligoj estas eblaj? Mi respondas: jes, ĉie. Kaj ne nur eble, sed ankaŭ dezirinde. Mi memorigas vin je la vortoj skribitaj de nia en Kristo ripozanta Patro P-ro Richardson, en „**Belga Katoliko**”:

„Ni estas katolikoj kaj ni estas esperantistoj. Kiel esperantistoj ni deziras daŭrigi niajn intimajn amikajn interrilatojn kun ĉiuj aliaj gesamideanoj Sed ni estas ankaŭ katolikoj, kaj estas, kompreneble, nia devo servigi Esperanton tiel kiel ĉiun alian kreitaĵon, al la plej granda gloro de Dio. Same kiel la kuracistoj, la presistoj, la laboristoj, la komercistoj servigas Esperanton al siaj apartaj intereso, kaj pri tio formas apartajn societojn kaj ligojn, ĉe kiuj Esperanto tute ne estas la celo sed nur rimedo, nur mirinda lingvilo, per kiu ili povus multhelpi, multprogresigi siajn proprajn anojn, — same la katolikoj servigas kaj pli kaj pli servigos la mirindan helplingvon en la ĉiu-

taga vivo por la Dia regno sur la tero, t. e. la „Sankta Katolika Eklezio”.

Pastro Richardson skribis tiel por klarigi sian deziron, ke la Belgaj Katolikaj Esperantistoj formu katolikan Ligon. *Tiu kialo taŭgas ĉie*, kie estas katolikoj, mi pensas.

Kiom ankaŭ nia unua internacia Prezidanto ŝatis la ligan: *Nederlanda Katoliko!* „Tie, li skribis, ĉio estas admirinde ordigita. Ĉiu grupo dependas de la Eklezia Aŭtoritato kaj havas Pastran Direktoron, nomata de la Episkopa Moŝto mem.” (*Belga Katoliko, Aprilo 1913, p. 6.*)

Kiam la Nederlanda Kardinalo, de kiu ĉiu Esperantista Katoliko konas la diron, ke „Esperanto multe servos al la Eklezio”, vizitis sian gepatran landon, preskaŭ ĉiufoje, kiam lia Kardinala Moŝto publike paroladis, li esprimas la Papan deziregon, ke la Katolikoj unuiĝu katolike. Laŭlitere li diris: „Vi ne aliĝu al neŭtralaj Asocioj, sed vi aliĝu al katolikaj. Unuiĝu vi sur katolika fundamento. De post kiam resonis la vorto de la granda Papo Leo XIII, „*Katolikoj, unuiĝu vi!*” kaj de post parolis nia sankta Papo Pio X: „*Katolikoj unuiĝu vi katolike*“, la unuiĝa vivo devas flori katolike”.

Eble estas, kiel oni vidis en Romo, ke ĉiulande ekzistas katolikaj ligoj de sportistoj: kial do ni, kiuj havas spiritajn celojn, kaj spiritan helpilon, kial do ni ne eblus unuiĝi katolike?

Sed ĉar la unu aŭ la alia lando ŝajnas tro granda kaj vasta por havi nur unu nacian ligan, tial en la regularo mi metis la vortojn: *nacia aŭ regiona*, ebligante tiamaniere ke en vasta lando oni laboru laŭregione. *Poste* eble tiuj regionaj ligoj formos landan ligan, sed ne estas necese en la nuna tempo por povi aliĝi al I.K.U.E.

Mi ankoraŭ devas diri, ke mia projekto nur estas ĝenerala regularo; la detalaj kaj pli intimaj aferoj poste, eble jam en la sekvonta numero de E. K., estos verkitaj. **Oni do evitu en la skribotaj diskutoj la tro detalajn aferojn.**

Lambert J. J. M. POELL, *) Pastro,
Prez. de Ned. Kat.

Tilburg (Nederlando).

La 24-an de Oktobro 1913.

*) La Nederlandan vorton POELL oni elparolu Pul.

PRI LA STATUT-PROJEKTO.

Kiel redaktoro de E. K. unue konatiĝinte kun la ensendita statutprojekto, mi havas nature la eblon kaj la privilegion, por esti la unua, kiu povas diri sian opinion pri ĝi. Mi volonte ekkaptas tiun ĉi okazon, por unualoke diri kelkajn vortojn pri la proponanta persono mem. Pastro POELL de post sia pastrigo tuj okupis sin intense pri la katolika sociala agado laŭ la principoj de LEO XIII kaj li estis la iniciatinto de multaj gravaj asocioj kaj laboroj. Kiel religia konsilanto de grandaj asocioj li ĉiam sin trovis meze de la unuiga vivo. Liaj meritoj en tiu direkto estas rekonitaj ĉie, ne malpleje de la Ekleziaj Aŭtoritatuloj, kies plenan konfidon P-ro POELL ĉiam ĝuis. Li fondis kaj redaktis gazeton, kiu inter la amaso da katolikaj periodikoj en Nederlando okupas gravan lokon. Li ankaŭ eldonis librojn pri socialaj demandoj. Li estas fama pro la majstreco, kun kiu li povas prezidi kaj gvidi kunsidojn; ĉeesti kunsidojn, preziditajn de li, estas ĝuado. Multaj ankoraŭ rememoros, ke li kiel vic-prezidanto de „Nia Dua” en Hago ofte prezidis kunvenojn anstataŭ P-ro RICHARDSON, kaj ke li diris gravan paroladon pri: „Esperanto kiel helpilo por elmigrantoj.” (Vidu E. K., Okt. kaj Nov. 1911).

La nederlanda katolika Ligo Esperantista „Nederlanda Katoliko” estas rigardata kiel grava katolika asocio; sufiĉas la nomo de ĝia Prezidanto POELL, por forigi la mokeman rideton sur la vizaĝo de skeptikuloj pri Esperanto.

Ni ŝuldas dankon al P-ro POELL, kiu, spite de sia multokupateco pro katolik-sociala laboro, tamen deklaris sin preta helpi nin per sia granda sperto pri organizado de asocioj.

* *
* *

Oni ofte komparas nian I. K. U. E. kun U. E. A. Jen, oni diras, rigardu al U. E. A.! Apenaŭ starigita kelkajn jarojn, jen ĝi brile sukcesas! Kaj nia I. K. U. E. nur malsukcesas!

Tiu komparo ŝajnas tre bela, tamen ĝi estas tute ne ĝusta, ĉar oni komparas du tute diferencajn aferojn. Kiam

U. E. A. stariĝis, oni trovis ĉie *pretajn naciajn* Asociojn Esperantistajn, oni eldonis pli ol 100 Esperanto-gazetojn. U. E. A. aperis kiel la unua provo de internacia organizo sur la Esperanta kampo. Ĝi organizis la esence internacian flankon de la Esperanto-movado, la *peresperantan* flankon. Ĉie tuj apogita de la *poresperantaj* aŭ propagandaj naciaj Ligoj kaj gazetoj, ĝi trovis tuj pretan materialon, pretajn Esperantistojn. Ĝi estas *tre ĝenerala* aplika asocio, kaj tiom ligita kun la Esperanto-movado mem, ke ankoraŭ nuntempe multaj Esperantistoj ne povas distingi la Esp. movadon de la U. E. A.-movado, kvankam la distingo klare ekzistas pro iliaj diversaj ĉefceloj.

Kun U. E. A. oni nun komparas la *tute specialan* I.K.U.E., kiu ĉe sia stariĝo trovis ankoraŭ tute nekulturitan kampon, kaj kiu movas sin nur sur kampo de Katolikismo. Jen la eraro; kaj ne miru, ke la konkludoj, bazitaj sur tiu falsa komparo, estas eraraj.

Oni devas kompari I. K. U. E. kun *samspecaj* Asocioj, kun aliaj specialaj asocioj de kuracistoj, juristoj, laboristoj, socialistoj, poŝtistoj, instruistoj k. t. p. Kaj jen ni subite transportitaj sur la plej alta ŝtupo de la ŝtuparo de specialaj asocioj. Efektive I. K. U. E. estas certe inter siaj *samspecaj* asocioj la plej grava kaj la plej disvastigita, kvankam ĝi ne ankoraŭ sukcesis, efektive organizi sin. —

* * *

Ofte ripetiĝas jenspecaj rimarkoj: Vidu U. E. A.; ĝi tiom sukcesas, ĉar ĝi havas Delegitojn en ĉiuj lokoj kaj ĉar ĝi eldonas Jarlibron kun ĉiuj adresoj k. t. p. Se I. K. U. E. nur farus la samon, jen nia tuta malsukceso tuj malaperus kiel la neĝo pro la suno, kaj ni estus savitaj! Kaj oni ne forgesas aldoni, ke la „*papera*” regularo taŭgas neniel kaj devas esti disŝirata.

Pri tio oni forgesas unu gravan aferon. Ĝi estas, ke precize la fidindeco de la delegitoj kaj de la jarlibro de U. E. A. estas kaŭzita per granda amaso da *regularoj*, kaj ja regularoj priskribantaj ĉiujn detalojn kaj *observitaj kaj obeitaj tre severe*. Imiti U. E. A. koncerne delegitojn kaj jarlibron — sed malzorgi, eĉ malŝati kun kompata rideto

regularojn kaj la severan disciplinon rilate al ili, tio estas vere naivegaĵo! ĉar la tuta sekreto pri la sukceso de U.E.A. kuŝas eksklusive en detalaj regularoj kaj nepre disciplino.

La unuefarotan oni faru: starigo de regularo **kaj** obeo al ĝi. (La unuan oni faris en Parizo, la duan oni forgesis).

Se oni nepre deziras imiti U.E.A., oni imitu ĝin efektive. Jen la regularoj (Vidu Jarlibron de U.E.A. p. 51—80):

1) Statuto de U. E. A. (celo kaj principoj — membroj — rajtoj de l' membroj — regiona organizo — distrikta organizo — faka organizo — centra organizo — diversaĵoj — financoj).

2) Financa regularo — 3) regularo pri la garantia kapitalo. — 4) regularo pri la servoj de U. E. A. 5) regularo pri konsuloj — 6) regularo de la kongresoj — 7) regularo de la universala interŝanĝa asocio. 8) regularo de la univ. laborista asocio. — 9) regularo de la univ. virinasocio. — 10) regularo pri la univ. studenta asocio.

Sed kompreneble I. K. U. E. ne estas U. E. A. — Oni devas starigi regularojn de I.K.U.E., taŭgajn por ĝiaj specialaj celoj kaj bezonoj.

* *
*

Sed — oni diros — pro kio sin bazi sur *naciaj* ligoj?! I.K.U.E. ja estas, eĉ laŭ sia nomo mem, *internacia* unuiĝo!

La kialon, pro kio sin organizi en *naciaj* ligoj laŭ *katolika* vidpunkto, bele priskribis P-ro POELL en siaj supraĵ „rimarkoj.” La Papoj Leo XIII kaj Pio X klare diris: Katolikoj, vi unuiĝu katolike. Kie ekzistas neŭtralaj ligoj, tie vi fondu pure katolikajn.

Nia prezidinto P-ro RICHARDSON same opiniis kaj faris: li fondis la „Belgan Katolikan Ligon Esperantistan” kaj ĝian organon „*Belga Katoliko*”.

Plue per *nacia* organizo iu *internacia* movado treege estas antaŭenpuŝata. Ĉu ne la U.E.A., konsistanta el *pretaj* Esperantistoj, rekrutas siajn anojn el la *naciaj* propagandaj Ligoj, kiuj varbas ne-esperantistojn? Kaj jen **fakto** reala kaj kontrolebla.: Ĉu I.K.U.E. ne sukcesas plej bone tie, kie ekzistas *nacia* (aŭ *regiona*) katolika ligo? Kaj tiu fakto estas konstatebla ne sole en nia I.K.U.E.! Ni prenu asocion ankoraŭ pli specialan, ekz. la *Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio* (T.E.K.A.). — U. E. A.-membro estas *Esper-*

antisto (ĉu katoliko, ĉu anarĥisto, k.t.p.; ĉu kuracisto, ĉu laboristo, k.t.p.); I.K.U.E.-membro estas *Katoliko* (ĉu kuracisto, ĉu laboristo, k.t.p.); T.E.K.A.-membro estas *kuracisto* (nur kuracistoj); do T.E.K.A. estas pli speciala ol I.K.U.E. — Kaj tamen oni spertis la samon; en landoj, kie ekzistas *naciaj* ligoj de kuracistoj (Rusujo, Polujo), tie T.E.K.A. la plej bone sukcesas. Pro tio dum sia lasta kongreso T.E.K.A. „unuanime akceptis“, ke oni „urĝe petu la „estraron aranĝi ĉie naciajn societojn, kie ili ne ankoraŭ „ekzistas.“ Kaj la sekretario de T.E.K.A. skribas (vidu „*Kuracisto*“, Sept.-Okt. 1913, p. 169):

. . . . La ĉefa laboro, kiun ni komencis, sed ankoraŭ ne povis fini dum la lasta jaro, estis la fondo de *naciaj filiaj T. E. K. A.-asocioj*. En la patrujo de nia kara lingvo, en Rusujo kaj rusa Polujo, jam ekzistas tiaj filiaj Asocioj kaj bone funkcias kaj al tiuj asocioj ni dankas niajn plej fidelajn anojn. Estas ja klare, ke naciaj asocioj povas pli bone propagandi, ĉar ili konas pli bone la personojn kaj la profesiajn bezonojn, — plue la nacia propagando estas multe pli malmultekosta kaj efika, ol la internacia. Sed la varbitajn membrojn kontentigas nur la internacia asocio kaj la profito ideala kaj morala, kiujn povas doni nia kara helplingvo, ekaperas nur, se la movado estas internacia. Tial la poresperanta propagando estas kaj nepre devas esti nacia kaj la peresperanta propagando estas laŭnature internacia, kiel en la ĝenerala esp. movado, tiel ĉe la kuracistaro. Do la naciaj filioj devas esti memstaraj por la poresperantaj aferoj, kaj iom dependantaj de la internacia organizaĵo koncerne la internaciaj aferoj, la organo k.t.p.

En Svislando la laboroj estas dank' al la klopodoj de niaj fervoraj kunlaborantoj D-ro Christen kaj D-ro Uhlmann tiel progresintaj, ke fondo de la filio jam nun estas ebla kaj funkcios espereble de la venonta jaro. Ankaŭ en Germanujo kaj Usono la afero bone marŝas. En aliaj landoj la sama afero pritraktiĝas, sed la fruktoj ankoraŭ ne estas maturaj.

Mi proponas jenan organizaĵon: La naciaj filioj elektas mem prezidanton, kiu samtempe estas la konsulo de la T.E.K.A. por la kamplimo de la nacia asocio

Per la naciaj ligoj, internacie kunligitaj per regularo, la aranĝoj ankaŭ estas tre plifacilitaj; oni ankaŭ povas garantii pli fidindajn donitaĵojn kaj servojn (*Kuracisto* p. 170):

. . . , Ke la naciaj filioj mem elektu la konsulon por sia lando, estas plej rekomendinde, ĉar ili scias plej bone, kiu estas vera pioniro de nia organizaĵo kaj kiu, eble, nur ŝatas la titolon de konsulo, sed ne volas labori por nia movado

. . . . Tia organizaĵo multe pli faciligos la laboron de la T.E.K.A. kaj de ĝia estraro. Ekzemple

Do, oni konfideme aprobu la principon, kiu de la komenco de nia movado estas proponita kiel la fundamento de I.K.U.E., kaj kiu ankaŭ estas la fundamento de la Projekto, proponita de P-ro POELL: *naciaj filioj*.

Tiu Projekto samtempe enhavas la ĝermon de „delegitoj” de I.K.U.E.; ĉar la proponita „speciala komisiono” en ĉiu nacia ligo estas nur la kunigo de la praktikaj elementoj, aŭ la organizo de la personoj, kiuj deziras esti praktike utilaj sur internacia kampo (la „speciala komisiono” de la projekto estas iom komparebla kun „distrikto” de U.E.A.).

* * *

Konkludante, mi trovas la proponitan projekton tia, ke ĝi prizorgas ĉiujn verajn bezonojn de nia movado. Kompreneble la Fundamenta Regularo enhavas nur ĝeneralizaĵojn. Pri la detaloj ni atendu la Detalaran (aŭ Pridetalan) Regularon (eble estus pli simple nomi la unuan „Statuto” kaj la duan „Regularo”).

Ĉiu, precipe la spertuloj en organizaj aferoj, kunhelpu kaj konigu sian opinion pri la Projekto de P-ro Poell.

D-ro SMULDERS.

Enketo de „Espero Katolika”.

N-ro 1. Respondoj pri la „Angla Ligo de Katolikaj Esperantistoj”.

1. Ĉu en via nacio ekzistas Ligo? — R. Jes.
 2. Kiun territorion ĝi okupas (ĝiaj limoj)? Anglujo kaj Kimrujo (Granda Britujo).
 3. Historieto pri ĝia starigo.
- Fondita de S-ro C. A. CARROLL, kiu komencis ĉe la

fino de la jaro 1911 formi komitaton, kiu estis plene formita en Decembro. La unua kunveno okazis la 18-an de Januaro 1912, kiu estis la oficiala naskiĝtago de la ligo. S-ro Carroll estis sekr. kaj kasisto, kaj Pastro EGBERS el Bury la prezidanto. La reguloj estis formitaj ĉe tiu-ĉi komitato.

4. Kiam starigita? Vidu supre. La loko estis Stockton-on-Tees, kie S-ro Carroll loĝis.

5. Ĉu ĝi havas regule aprobitan regularon? Jes. Aprobitan de la komitato kaj de Pastro RICHARDSON.

6. Ĉu aprobita de la Registaro?

Nia Ligo ne estas aprobita de la Brita registaro, ĉar ni ne ankoraŭ serĉis tiun aprobon. Tial la nomo de nia ligo ne jam aperis en la Ŝtatĵurnalo.

7. Ĉu aprobita de la Episkoparo?

La ligo estas aprobita de la episkopo de Hescham kaj Newcastle. La Episkopo de Salford, kvankam li ne tute aprobis, tamen ne kontraŭstaros la ligon pro la aprobo de la Papo. La aliaj episkopoj ĝis nun ne diris tion, kion ili decidis, krom tio, ke la Kardinalo BOURNE diris, ke li ricevis la informojn kaj konsideros ilin.

8. Ĉu ĝi havas religian konsilanton, kaj se jes, ĉu elektitan de la Episkopo?

La ligo havas Pastron EGBERS kiel prezidanto kaj Pastron DAWSON S. M., kaj Patron TAYLORSON en la komitato, sed neniu estis elektita de iu episkopo.

9. Kiamaniere la Ligo estas interne konstruita k. t. p.

Ĝi estas direktata de la komitato, kies sekretario *nun* estas F-ino COOK. Ĝi havas nur plenajn membrojn kaj ordinarajn membrojn. La ordinaraj membroj estas membroj de grupo aŭ grupo filiiĝinta(j) al la ligo.

10. Kiom estas la deviga kotizaĵo por la membriĝo?

La kotizaĵo por plena membro estas 1.50 Sm., por ordinara filiiĝinta membro, ĝi estas 25 Sd.

11. Kiom da pagintaj membroj ĝi havas hodiaŭ?

Ĝi *hodiaŭ* havas nur ses (6) pagintajn-plenajn membrojn kaj dek (10) filiiĝintajn membrojn.

12. Kiu estas ĝia estraro, ĝia sekretariejo aŭ adreso, k.t.p.

Prezidanto: Pastro EGBERS el Bury. Sekretariino: F-ino A. E. COOK, **21 Alexandra Place, Newcastle-upon-Tyne**. Kasisto: S-ro J. J. COOK, sama adreso.

Komitato: Pastro DAWSON. S. M., Pastro TAYLORSON, Rev. J. A. H. CARROLL, S-ro HOVELAR, S-ro W. MACKAY kaj S-ro COOK.

La ĉefa sidejo: Newcastle-upon-Tyne.

13. Ĉu ĝi havas oficialan organon?

Jes. Sed pro la malmulteco de la membroj ĝi nur aperis dufoje ĝis nun, nome — en Marto 1912 kaj Februaro 1913. Nova numero aperos dum la proksimaj semajnoj. La nomo estas: „*La Katolika Esperantisto (The Catholic Esperantist)*”. Ĝia preciza adreso: S-ro Wallace MACKAY, redaktoro kaj administranto, 25 Breamishstreet, New-Castle-upon Tyne. Abonprezo: nenia prezo, sed estas sendita senpage al la plenaj membroj sole. La ordinaraĵaj membroj ne ricevis ĝin.

14. Ĉu la ligo aŭ ĝiaj membroj eldonis aliajn verkojn? Ne ankoraŭ.

15. Rimarkindaj okazintaĵoj post ĝia starigo.

1. Ŝanĝo de sekretarieco de S-ro Carroll al F-ino Cook.

2. Starigo de grupo en New-Castle-upon-Tyne en Junio 1913, en kiu troviĝas la dek ordinaraĵaj membroj de la A. L. K. E.

16. Ĉu la ligo deziras aliĝi al I. K. U. E. kaj sin submeti al la regularo, starigota dum „Nia Kvina”?

Pro la malmultaj membroj ni ne povas aliĝi, kvankam ni tre certe deziras. Bonvolu noti *klare*, ke la aliĝaj kotizaĵoj por 25 membroj dum 1912 estis pagitaj al la I. K. U. E. de S-ro Carroll. Multaj el la tiamaj membroj ne jam pagis la kotizaĵon por ĉi tiu jaro, pro kio ni ne eldonis multajn organojn.

Pri „Nia Kvina” kaj la regularo ni ne jam decidis, sed mi povas diri, ke estas preskaŭ certe, ke ni faros tion, kion vi demandas.

Katolikaj lokaj grupoj nur unu:

„La Novkastela Societo de katolikaj Esperantistoj”, filiigita al la I. K. U. E. Prezidanto: S-ro Cook. Sekretario:

S-ro Wallace Mackay, 25 Breamishstreet, New-Castle-on-Tyne. Entute 12 membroj. Okazas du kursoj.

No. 2. Respondo pri la Enketo de „Espero Katolika”.

1. En Nederlando ekzistas Ligo; ĝia nomo estas *Nederlanda Katolika Esperantista Ligo*: „*Nederlanda Katoliko*”.

2. Ĝi okupas la tutan teritorion de Nederlando.

3. Du personoj S-ro Joh. LUNEMAN el Hago kaj S-ro H. B. VAN ZWET el Utrecht konatiĝis pere „Espero Katolika” en 1907 kaj poste vizitis unu la alian. Ili iniciatis fondi Ligon de Katolikaj Esperantistoj kaj laboris fervore. Feliĉe ili trovis aliajn personojn, kiuj volis kunlabori, kaj precipe S-ro LUTKIE el 's-Hertogenbosch faris multajn klopodojn por efektiviĝi nian celon.

4. La 24-an de Aŭgusto 1909 la Ligo estis starigita en 's-Hertogenbosch.

5, 6, 7. Dum la sama jaro la Ligo ricevis la reĝinan kaj episkopan aprobon.

8. La Ligo havas religian konsilanton elektitan de la episkopo.

9. La Ligo estas interne konstruita jene:

Membroj de la Ligo estas Katolikaj, per Episkopo aprobitaj, lokaj grupoj. Loka grupo fariĝas membro per skriba sciigo al la ĉefsekretario kaj per akcepto de la ĉefestraro post aprobo de ĝia regularo koncerne akordiĝo kun la Lig-regularo. — Por membriĝi la loka grupo devas konsisti el almenaŭ 7 personoj. — Grupoj, kiuj agas kontraŭe al la Lig-regularo aŭ al la decidoj de la ĝeneralaj kunvenoj, povas esti forstrekita de la membrolisto per decido de la unuevenonta ĝenerala kunveno. — „Favorantoj” estas la personoj, kiuj pagas unufoje 25 guldenojn aŭ jare 2.50 guldenojn en lokoj, kie ekzistas aliĝintaj grupoj, aŭ 1.50 guldenojn, kie ne ekzistas grupo.

Ĝeneralaj kunvenoj okazas almenaŭ unufoje ĉiujare en Aprilo (la oficiala jarkunveno), aŭ kiam la Ligestraro opinias ilin necesaj, aŭ kiam unu triono de la lokaj grupoj deziras ilin skribe kaj motivite. La ĝenerala kunveno ek-

zistas el la reprezentantoj de la lokaj grupoj; nur tiuj reprezentantoj voĉdonas, havante tiom da voĉoj, kiom ili rajtas laŭ la regularo. Krom la reprezentantaj voĉdonantoj rajtas ĉeesti la kunvenon ĉiu ajn. — Proponoj, pritraktotaj dum la ĝen. kunv. povas esti farataj de la Ligestraro aŭ de kiu ajn loka grupo; la proponoj de tiuj lastaj devas esti komunikataj al la ĉefsekretario, skribitaj kaj subskribitaj de la grupestraro, almenaŭ tri monatojn antaŭ la ĝen. kunv. Du monatojn antaŭ la ĝen. kunv. tiuj proponoj estas komunikataj al ĉiuj grupsekretarioj. La amendementoj pri tiuj proponoj devas esti alsenditaj al la ĉefsekretario almenaŭ unu monaton antaŭ la ĝen. kunv. — La grupsekretarioj poste ricevas la plenan agendon de la kunveno.

Fakoj aŭ Komisionoj. 1. Komisiono por la gazetaro (tasko: disvastigi Esperanton en la Nederlanda Katolika gazetaro per artikoloj k.t.p.). — 2. Komisiono por studado kaj legado (propagandas „Espero Katolika” kaj katolikajn aŭ bonajn Esperanto-verkojn). — 3. Komisiono por informoj (pri religiaj kaj socialaj demandoj por „Espero Katolika”; informoj al fremdaj Esperantistoj vojaĝantaj). — 4. Komisiono por la propagando (pri Nederlanda Katoliko”, por varbi novajn membrojn kaj por starigi novajn grupojn; ĝiaj anoj estas pretaj paroladistoj). — 5. Komisiono por la biblioteko. — 6. Komisiono por internaciaj aferoj. —

Ĉiu Komisiono havas sekretarion elektitan de la ĉefestraro kaj konsistas almenaŭ el tri membroj.

En la regularo plue sin trovas artikoloj pri nomo kaj sidejo, celo, rimedoj, regularŝanĝo, dissolvo, la elektoj de la Ligestraro kaj de la Ĉefestraro, la oficiala organo, k.t.p. Ĉiuj necesaj detaloj estas priskribitaj kaj discipline observitaj. La organiza sistemo de „Nederlanda Katoliko” pruvigas praktika kaj sukcesiga dum kvar jaroj. —

10. La deviga kotizaĵo estas por ĉiu membro de la lokaj grupoj f 1.— (0.80 Sm.).

11. 783 pagintajn membrojn ĝi nun havas.

12. Ĉiu aliĝinta loka grupo elektas el ĝia membraro unu personon; tiuj ĉi personoj formas la ligestraron. La ligestraro elektas ĉiujare ĉefestraron. Por 1913 estas la

ĉefestraro: P-ro L. J. J. M. POELL, prezidanto, Tilburg; J. P. L. NIESTEN, subprezidanto, Rotterdam; H. B. VAN ZWET, ĉefsekretario, Utrecht; P-ro H. LINNEBANK, 2-a sekretario, Uden; Th. C. VAN ERP, kasisto, Bergen op Zoom; J. N. J. SMULDERS, Udenhout; P. A. SCHENDELER, Veghel.

La sekretarioj estas: Leeuwstraat 3-bis, Utrecht (Nederlando).

13. La Ligo havas oficialan organon nomitan: „*Nederlanda Katoliko*”; ĝi aperis ĉiumonate de post Januaro 1910 kaj ĝis nun eliris 46 numeroj.

La ĉefredaktoro estas S-ro D-ro J. N. J. SMULDERS, Udenhout; redaktoro kaj administranto estas S-ro H. DAMEN, St. Crispijnstraat 57, 's Hertogenbosch (la lasta estas ankaŭ la adreso de la gazeto).

La membroj de „Nederlanda Katoliko” ricevas la organon senpage; por aliaj personoj la abonprezo estas: Nederlando f 1.— (0.80 Sm.); Belgujo Sm. 0.87; aliaj landoj Sm. 1.04.

La ekzempleraro estas 1000.

14. La Ligo eldonis, krom multaj propagandiloj, grandan propagandan broŝuron *Aan Esperanto de Toekomst!* (al Esperanto la Estonto!) verkita de D-ro Smulders.

Verkoj, eldonitaj de la membroj: *Garcia Moreno*, en Esp. tradukita de S-ro Joh. Lüneman. — *Ĉu la Kredo estas en batalo kontraŭ la scienco?*, tradukita de S-ro Joh. Lüneman. — *Wereldtaal*. (Mondlingvo), nederlandlingva propaganda parolado okaze de la starigo de „Nederlanda Katoliko”, de S-ro W. Lutkie. — *Spirita Juvelaro*, katolika Preĝolibro kun eklezia aprobo, verkita de nederlandaj pastroj. — *Kie estas la Eklezio de Kristo?*, verkita de P-ro M. v. d. Hagen S. J., tradukita de F-ino M. Borret (kun eklezia aprobo). — *Leerboek der Wereldhulptaal Esperanto* (Esperanto-lernlibro detala, 270-paĝa), de Majoro J. P. L. Niesten. — *De redacteur van „De Gids” als beoordeelaar van Esperanto* (La redaktoro de „De Gids” kiel prijuĝanto de Esperanto), de Majoro Niesten. *Elementara lernlibro de Esperanto*, de S-ro P. A. Schendeler. *Sinpruvilo* (porekzamenaj frazoj), de S-ro Schendeler. Esperanto-glumarko kun nederlandlingva surskribo „Leert

Esperanto” de S-ro C. Prinzen. Esperanta Moerkerk-poŝtkarto, desegnita de la artisto Moerkerk; kaj Esperanta Moerkerk-glumarko, ambaŭ eldonitaj de la 's Hertogenbosch'a Katolika Esperantista grupo.

15. La jaraj jarkunvenoj kaj Esperanto-tagoj karakteriziĝis je ĉiam kreskanta partoprenado. Kelkaj ciferoj; al la 3-a jarkunveno (1912) en Schiedam partoprenis 100 personoj; al la Esperanto-tago en Veghel (1912) 200 personoj; al la 4-a jarkunveno en 's Hertogenbosch (1913) 250 personoj; al la 2-a Esperanto-tago en Tilburg (1913) 600 personoj.

16. La Ligo deziras aliĝi al I.K.U.E. kaj submeti sin al al regularo de I.K.U.E.

Por „Nederlanda Katoliko” :

L. J. J. M. POELL, prezidanto.

H. B. VAN ZWET, ĉefsekretario.

No. 3. Katolika Esperanto-Grupo BERLIN (Germanujo).

Adreso S-ro Oscar FROMM, Luckenwalterstrasse 11-a, Berlin S. W. 11. La Grupo havas 26 membrojn, kiuj kunvenas ĉiulunde vespere je la oka en Hotel Stewen, Niederwallstrasse 11. En Oktobro 1913 komencis 3 novaj Esperanto-kursoj.

(Laŭ komunikoj de S-ro Oscar FROMM).

No. 4. Katolika Grupo „Antaŭen kun Kredo” en BROMBERG (Germanujo).

Fondita 27 Marto 1913. Ĝi abonas E.K. Prezidantino: F-ino BOGUSLAVSKA, Parkstr. 18. Vic.-prezidanto S-ro K. LEWANDOWICS. Sekretariino F-ino H. KROLIKOWSKA. Kasisto S-ro V. STRYZEWSKI. Entute 22 membroj. La kunvenoj okazas ĉiumarde je la 8^{1/2} vespere. En **Germanujo** ne ankoraŭ ekzistas Ligo; sed mi serĉas adresojn de Katolikaj Germanoj.

Preposto BECKER, Pastro.

No. 5. IRLANDO. Responde al via 1-a demando „ĉu en via nacio ekzistas Ligo?” mi malfeliĉe respondas „ne”.

Antaŭ du aŭ tri jaroj mi provis fondi Ligon, sed mi malsukcesis. Dum kelke da tempo mi penadas pretigi la

vojon por fari novan provon. Mi esperas, ke tiun ĉi fojon mi sukcesos.

Patrick PARKER, Pastro.

No. 6. En mia regiono **BORDEAUX (Francujo)** ne ekzistas ligo de Esperantistoj Katolikaj (en tiu ĉi regiono kuŝas Lourdes, la urbo de Nia Kvina).

L. MARQUET,
25 Cours de l' Intendance.

No. 7. Grandduklando Oldenburg (Germanujo). Mi loĝas en la grandduklando Oldenburg. Ĉi tiu konsistas el tri diversaj partoj: 1. la duklando Oldenburg; 2. la princlando Lübeck; 3. la princlando Birkenfeld.

En la duklando Oldenburg ĝis nun ekzistas Katolika grupo aŭ ligo; ĉu en Lübeck aŭ Birkenfeld mi ne scias, sed tre ne verŝajne.

LAMMERS,
Friesenstr. 8, Oldenburg in Gr.

E. K. kore dankas ĉiujn respondintojn kaj petas afable la ankoraŭ ne respondintojn kunlabori al la plena sukceso de nia enketo, kies teksto estas represita sur la kovrilo de tiu ĉi numero.

Respondo pro Protesto.

Karaj Legantoj,

Dank' al Dio, mi ne estas tre ofendiĝema; pro tio mi ne konsideras min ofendita de la akraj „protestoj” de mia amiko Smulders en la Oktobra numero de E. K. Sed unu vorton mi petas la permeson respondi:

1-e. *Rilate al la raporto pri la Budapeŝta Kongreso.* — D-ro Smulders min kulpigas pro manko de tiu raporto. En Budapeŝt, tute kiel en Romo, kaj alie, mi estis devigata ĉiam partopreni en la diskutado kaj plenumi la *materialan taskon* de la Prezidanto. Skribi alion ol la Deziresprimojn, kiujn mi cetere aperigis en E. K., mi absolute ne povis. Mi vane serĉis helpantojn: unu promesis helpi, kaj ne faris. Konkludo...

Post la kongreso, mi petis la arĥiviston de I.K.U.E. sendi la raportojn al mi *dum kelkaj tagoj* por verki raporton. Li ne respondis... Do...

2-e. *Rilate al la raporto pri la unua laborkunsido en Romo.*

La redakcio de *Osservatore Romano* petis de mi tiun raporton; mi ĝin pruntis kondiĉe, ke oni senmanke redonu. Diversfoje mi ĝin petis poste... Ĝin perdis la dirita Redakcio. Feliĉe ekzistas duoblaĵo. Sed alian fojon mi ne pruntos... Oni iam riproĉis, ke mi estas iom tro konfidema.

Cl. COLAS.

Rimarko de la Redakcio. El la respondo de nia amiko Colas montriĝas, ke li estis la dupo de ne-kunlaboro de aliaj dum kaj post Nia Tria; ankaŭ al ni kaj al P-ro Richardson la tiama Arĥivisto de I.K.U.E. konstante rifuzis la manuskriptojn de la kongresparoladoj por aperigi ilin en E. K.; — kaj la dupo de lia troa konfidemo je la redakcio de la *Osservatore Romano*. S-ro Colas estas do senkulpigebla, sed por la veraj kulpuloj restu la protesto.

Komunikoj de la Redakcio.

E. K. aperas ĉiumonate la 10-an. Pro tio niaj karaj kunlaborantoj bone notu, ke la redakcio *ne povas garantii* la presadon, en la plej proksima numero, de artikoloj alvenantaj *post la 25-a*.

Ĉiu numero de E. K. havas 32 paĝojn (pezo 50 gramojn). Se ni donas eĉ nur 4 paĝojn pli, ni devas pagi duoblan poŝtelspezon (sufiĉe pli granda sumo). Ne estas malfacile, eldoni ĉiumonate 64 aŭ 96 paĝojn, sed, pro la malalta abonprezo kaj la ankoraŭ tro malgranda nombro da abonantoj, ni devas kiel eble plej ne superi 32 paĝojn. En 32 paĝoj ni kompreneble ne povas tuj presigi ĉiujn manuskriptojn, kiujn oni bonvolis sendi. Ofte ni devas provizore flankenmeti eĉ gravajn artikolojn pro manko de spaco (i. a. la 14-paĝa artikolo de S-ro Nankivell pri „La Monaĥoj de Caldey”). Niaj kunlaborantoj iom pacienciĝu, konsiderante la ne-eblecon presigi ĉion kune en 32 paĝoj. Precipe pro tiu ĉi komunikado oni ne ĉesu, konstante alsendi manuskriptojn.

En la Oktobro N-ro 99 restis sufiĉe da preseraroj precipe en la Oficiala Raporto; tiu ĉi estis rapide skribita dumkongrese, parte je krajono, tiel ke eĉ post dufoja korektado de la presprovoj restis preseraroj. Plumeraro de la redaktoro mem estas *samedon* (p. 248) anstataŭ sabaton (do ne imputebla al la raportisto!). Plumerare la redaktoro ofte skribis precise anstataŭ precize.

Lastmomente ni ricevis kopion de la oficiala oficdona letero de la Episkopo de Buskoduko (Nederlando), sciigante pri elekto de P-ro Poell kiel Religia Direktoro de E. K. anstataŭ P-ro Richardson. La ĉefestraro de I.K.U.E. elektis S-ron Schendeler kiel prezidantokomisaron de la Akcia Societo E. K. Al ambaŭ novfunkciuloj rapidan gratulon! En la Decembro N-ro ni preparolos tiujn elektojn pli detale.